

En malplena preĝejo

Tiel mi kutimas, kiam faliĝas vespero,
en malplenan preĝejon mi sekrete eniras.
Animo, kiu vizitas Dion.
Seriozaj vizaĝoj de sanktuloj brilas sur min.


Se nuptafesto estis hodiaŭ: longe forgesite,
nek estas meso, nek pastroj en dalmatiko,
sur la altaro lumas du kandeloj,
kun mia Dio mi estas sola.

La preĝejo malplenas, mia animo plenas.
Ni komprenas unu la alian, kvankam ni ne havas vortojn,
tie ĉi mi staras, vidalvide kun Li,
kaj neniuj vidas, ke ni estas kune.

Mi staras, ne genuigas min la potenco de deziro
nur serĉadas mi la grandan Volon;
ĝis tiam mi staras, ĝis kiam Li volas
kaj se ne volas: mi falsidiĝas.

Tiel senfina adoro kaptas min,
kvazaŭ mi en arbaro vidus stelon,
kie la ĉiama, praa silento festas,
kvankam – mi estas nur en preĝejo.

Sándor Reményik,
hungara poeto
(1890-1941)



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Philippe Cousson

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady,
Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

| | |
|-------------------------------------|-----|
| Nekutimaj vortoj | 123 |
| Vi, mia lumo ... | 124 |
| Ŝafroj – kaproj | 125 |
| Apostoloj kaj iliaj atributoj | 128 |
| Berlina muro ... | 130 |
| ... kaj la Fera kurteno | 131 |
| Kristana kongreso – Legnica | 132 |
| Aliĝilo al kristana kongreso 2020 | 133 |
| Grete Burkhardt, adiaŭo | 136 |
| Grete Burkhardt, el funebra prediko | 138 |
| lom gramatike | 140 |
| Informetoj | 141 |
| Kotizoj por 2020 | 142 |
| Brilu, stel', de l' ĉiel | 144 |

Redaktoraj vortoj

Kara leganto, finfine venas la sesa numero kun informo pri la somera kongreso. Okazos en Legnica, Pollando. Vi trovas pli da informo kaj aliĝilo en la mezo de la gazeto. Aliĝilon kaj informon vi ankaŭ trovas surrete ĉe: keli.sea-vroc.eu/aligilo-kaj-kotizoj/

Ni esperas ke multaj povas veni kaj ĝui la etoson en kristana kaj familia rondo. Tamen ni ne forgesu la gravan temon, nian taskon kaj nian respondecon gardi nian planedon,

En la nuna gazeto vi ankaŭ trovas la malĝojigan informon ke Grete Burkhardt, la edzino de Adolf Burkhardt, forpasis en novembro. Certe multaj inter la legantaro renkontis kaj ekkonis ŝin dum kongresoj, kie ŝi ofte gvidis dancojn.

Ĝuu la baldaŭajn festajn tagojn kaj trovu trankvilecon inter multaj devoj.

Mi deziras al vi belan Kristnaskan feston kaj sukcesan komencon de la nova jaro.

Nekutimaj vortoj

Artikolo de József Farkas, 12 decembro 1987

Tradukis Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Kelkfoje ni trovas nekutimajn vortojn en la skribaĵoj de teologoj. Ekzemple: Dio estas *solidara* kun ni, Dio *suferas*, Dio *kaŝas sin*, *silentas*. Ankaŭ tion oni anoncis: Dio mortis! Se ni havas historian aspekton pri tiuj nekutimaj vortoj, ni rimarkas, ke same kiel ĉio en tiu ĉi jarcento malcertiĝis, ankaŭ la fundamentoj moviĝis. La teologio ne fariĝis escepto. Okazis grandaj faliĝoj kaj ankaŭ naskiĝis novaj ekkomprenoj. Ni travivas la evangelion en novaj koloroj kaj riĉeco, kaj tiun ĉi „novan” ni ŝatus esprimi. Sed nun ni ankoraŭ povas nur balbuti. Tiel ni devas interpreti la nekutimajn vortojn.

Okazas ankaŭ tio, ke ni ripetas la malnovajn vortojn, sed per la volo, ke ni mal-larĝigu la signifon. Pri ĉi tio ni montras nun ekzemplon. Elradias adventan etoson la vorto: *atendi*. “*Bone estas esperi pacience [do atendi] helpon de la Eternulo*” (Plorkanto 3,26). Kutime ni pensas pri la esperplena atendado de la homo, kiam ni citas tiun ĉi versiklon (atendado de la festo, aŭ pli profunde: la atendado de la reveno de Kristo). Sed ni devas larĝigi la enhavon de tiu ĉi vorto: ankaŭ Dio atendas. “*Tial la Eternulo*

atendos, antaŭ ol Li vin korfavoros...” (Jesaja 30,18) Kion atendas Dio? Kial atendas kaj ĝis kiam atendas? La Biblio donas al tiuj demandoj diversajn respondojn, ekz: pro tio Dio atendas, “... *ke ĉiuj venu al pento*” (II. Petro 3,9).

El la multaj taŭgaj versikloj ni nun elprenas unu, tiun, kiu havas ekstraordinare aktualan adventan mesaĝon. En la parabolo de la vinkultivistoj la sinjoro de la vinberejo atendas ke ricevu sian parton de la frukto de la vinberejo. Sed vane li sendas unu post la alia la sklavojn, ĉiuj skurĝite kaj malhonorige venas reen, kaj senhave. “*Kaj la sinjoro de la vinberejo diris: Kion mi faru? Mi sendos mian amatan filon; eble lin ili respektos*” (Luko 20,13).

Atendas la sinjoro de la vinberejo: eble prudentiĝos la kultivistoj se li sendas al ili sian filon. Dio atendas: eble honorigas la homoj la Filon, tiun donacon, kiun kristnaske Li donacas al la homaro. Eble ili ekkomprenas, ke la unu nura garantiaĵo, ebleco kaj vojo de la restado kaj resaniĝo de la homaro estas se ili “respektas” la Filon de Dio. Sed kiam venas tiu ĉi tempo? Kiom da sufero, milito, malsato, malsano bezonas ankoraŭ, ke la aroganta, senkompata,

egoisma homaro sobriĝante omaĝu antaŭ la Princo de la Vivo?

Malgrandskale devas komenciĝi, kaj ĉe ni devas komenciĝi la afero. Alproksimiĝas la festo de Kristnasko, kaj akriĝas la demando: Ĉu ni, la templa popolo de Dio, ĉu ni *respektas* la “filon” de la sinjoro de la vinberejo, Jesuo? En la staltrogo ĉe la lulilo de Jesuo, kiu naskiĝis pli malriĉe ol ni ĉiuj, ĉu ni povas ĝoje danki por la riĉa festa tablo? Ĉu ricevas, kaj kiom ricevas, la malriĉuloj de nia abundo?

La esperanta atendado de Dio (eble ili respektos mian filon) per aliaj vortoj tion signifas: *kompato*. “*Ĝi estas favorokoreco de la Eternulo, ke ni ne tute pereis...*” (Plorkanto 3, 22).

Per amaraj vortoj Jesaja avertas nin, ke tiun ĉi favorkorecon eblas ankaŭ

fiuzi. “*La vinberĝardeno ... la domo de Izrael ... Li esperis justecon, sed montriĝis malnoblaĵo — bonagojn, sed montriĝis kriindaĵo*” (Jesaja 5,7).

Ni atendas, ke en nia malriĉeco, en niaj pekoj Dio kompatu nin. Li atendas, ke el la pleneco de Sia amo Li kompatu nin. Tiuj ĉi du “atendoj” ĉirkaŭbrakumadas kaj realiĝas, se ni “respektas Lian Filon”, Lian plej altvaloran donacon, Sinjoron Jesuo Kriston.

Antaŭe ni pensis, ke ni devas senkolerigi la koleran Dion. Hodiaŭ ni jam scias: Dio – kiu volas doni al ni donacon – atendas: kiam ni akceptas tion, kion li en Sia Filo kaj per Sia Filo volas donaci al ni.



VI, MIA LUMO...

Por ke tiuj kiuj rigardas min
ne vidu mian personon,
sed Vin en mi,
restu kun mi.

Tiel mi brilegos el Via brilego
kaj povos esti lumo por la aliaj.

Mia lumo venos nur de Vi, Jesuo,
estos mia eĉ ne unu malgrada radio.

Estos Vi tiu, kiu lumigos la aliajn pere de mi.
Inspiru al mi la laŭdon kiun Vi plej ŝatas,
prilumante la aliajn cirkaŭ mi.

Mi Vin anoncu

ne per la vortoj sed per la ekzemplo, per la
atesto de miaj faroj
per la videbla elano de la amo
kiun mia koro ricevas de Vi.

Amen.

El Patrino Tereza:
Preĝoj kaj pensoj

Tradukis Antonio De Salvo

Ŝafoj – kaproj

Prediko dum kongreso en Révfülöp, 15 aŭgusto 2019

Philippe Cousson, FR

Karaj gefratoj, Ni troviĝas antaŭ tre konata teksto, sed teksto ofte miskomprenata. Temas pli pri parabolo ol pri priskribo de la fina juĝo. Krome, kiam oni aŭdas aŭ legas komentojn pri tiuj versikloj, leviĝas pluraj demandoj.

Ĉu la teksto celas la kredantojn aŭ la nekredantojn, la naciojn, ĉu ambaŭ? Ni ja scias dank' al la reformatoroj kaj ne nur de ili, ke la savo de la kredantoj ne ligiĝas al ilia agado. — La savo estas kaj restas senmerita donaco de Dio!

Kiuj estas tiuj plej malgrandaj fratoj de la Reĝo? Ĉu la malriĉuloj, la bezonantoj estas Jesuo mem, estas bildoj de Jesuo? Ĉu tiuj estas la disĉiploj (miaj fratoj)?

Tamen, troviĝas konkludoj, kiuj ne dependas de la respondoj al tiuj demandoj. Oni povas imagi al si la rakonton kiel sceno de opero, teatro aŭ kino, tre impona, impresa kaj majesta sceno. Multaj homoj, amasoj, antaŭ anĝeloj kiuj ĉirkaŭas reĝon, lumo, bruo, muziko, laŭdkantoj.

Tiu rakonto, ĉar esence ĝi estas rakonto, prezentas kvar grupojn. Unue kaj ĉefe, la Filo de homo, poste nomata la Reĝo, kun la anĝeloj, en gloro kaj majesto.

Poste du grupoj de la nacioj aŭ nacioj, dekstre kaj maldekstre. Kompreneble, ne temas pri politiko.

La kvara grupo ne videblas, sed ili estas ĉie en la paroloj, temas pri la

Mateo 25:31-46

31 Sed kiam la Filo de homo venos en sia gloro, kaj ĉiuj anĝeloj kun li, tiam li sidos sur la trono de sia gloro; 32 kaj antaŭ li kolektiĝos ĉiuj nacioj, kaj li apartigos ilin unu de alia, kiel paŝtisto apartigas la ŝafojn for de la kaproj; 33 kaj li starigos la ŝafojn dekstre de li, kaj la kaprojn maldekstre. 34 Tiam diros la Reĝo al tiuj, kiuj staras dekstre de li: Venu, vi benataj de mia Patro, heredu la regnon preparitan por vi de post la komenco de la mondo; 35 ĉar mi malsatis, kaj vi donis al mi manĝi; mi soifis, kaj vi donis al mi trinki; mi estis fremda, kaj vi gastigis min; 36 nuda, kaj vi vestis min; mi malsanis, kaj vi vizitis min; mi estis en malliberejo, kaj vi venis al mi. 37 Tiam respondos al li la justuloj, dirante: Sinjoro, kiam ni vin vidis malsata, kaj vin satigis? aŭ soifanta, kaj trinkigis vin? 38 Kaj kiam ni vin vidis fremda kaj gastigis vin? aŭ nuda, kaj vin vestis? 39 Kaj kiam ni vin vidis malsana aŭ en malliberejo, kaj venis al vi? 40 Kaj la Reĝo respondos kaj diros al ili: Vere mi diras al vi: Kiom vi faris al unu el ĉi tiuj miaj fratoj la plej malgrandaj, tiom vi faris al mi. 41 Tiam li diros al tiuj, kiuj staras maldekstre: For de mi, vi malbenitaj, en la eternan fajron, kiu estas preparita por la diablo kaj liaj anĝeloj; 42 ĉar mi malsatis, kaj vi ne donis al mi manĝi; mi soifis, kaj vi ne donis al mi trinki; 43 mi estis fremda, kaj vi ne gastigis min; nuda, kaj vi ne vestis min; malsana kaj en malliberejo, kaj vi ne vizitis min. 44 Tiam ili ankaŭ respondos, dirante: Sinjoro, kiam ni vidis vin malsata, aŭ soifanta, aŭ fremda, aŭ nuda, aŭ malsana, aŭ en malliberejo, kaj ne servis al vi? 45 Tiam li respondos al ili, dirante: Vere mi diras al vi: Kiom vi ne faris al unu el ĉi tiuj la plej malgrandaj, tiom vi ne faris al mi. 46 Kaj ĉi tiuj foriros en eternan punon, sed la justuloj en eternan vivon.

mankhavaj, malgrandaj homoj, ankaŭ nomataj la fratoj de la Reĝo.

Apud la paroloj estas ankaŭ moviĝoj. La Reĝo venigas la dekstran grupon al heredo de la Regno, preparata por ili. Tiuj estas diritaj benataj. La Reĝo forpelas la maldekstran grupon al eterna fajro preparita por la diablo kaj liaj anĝeloj. Ili estas diritaj malbenitaj.

(Parenteze, mi ne scias kial la tradukistoj malsame elektis la participojn: benata kaj malbenita?)

Ni ja scias ke ni estas pekuloj, sed pardonitaj pekuloj,

La Reĝo gratulis kaj riproĉis la grupojn pri similaj agado kaj senagado, antaŭ la mankhavaj homoj, tiuj asimilitaj al la Reĝo mem. Tion neniu antaŭsciis, konsciis.

Tradiciaj interpretoj de la rakonto asimilas tiujn senhavulojn al la Reĝo, kiu estus Jesuo mem. Kaj tion oni ofte aŭdas en predikoj, kantas en himnoj. Aliaj predikas ke la disĉiploj estas tiaj, ke ili povas troviĝi en tiu situacio de bezonantoj.

Tamen, mi volas iri pli kernem. Ne estas utile identigi la malriĉulon kun Jesuo. Oni ne devas helpi la malriĉulon por helpi Jesuon. Oni ne devas helpi la malriĉulon ĉar oni helpus Jesuon. Sed oni devas helpi la malriĉulon por helpi la malriĉulon, nutri la malsatulon por nutri la malsatulon, trinki la soifanton por trinki la soifanton, gastigi la fremdulon por gastigi la fremdulon, vesti la nudulon por vesti la nudulon, viziti la malsanulon por viziti la malsanulon, iri al la malliberulo por iri al la malliberulo.

Heredi la Regnon, la regnon preparitan de la komenco, tio ne estas nur en la futuro. Tio estas ankaŭ efektiva nun, efektiva nun. Kaj la efektiva de la Regno venas ĝuste kiam oni agas en la ĝusta maniero priskribita en tiu rakonto. La Regno de Dio estas, kaj jam ĉi tie, kaj ankoraŭ ne alveninta. Ĝi estas promeso, espero kaj samtempe tasko, vivenda efektiva.

La disĉiplo estas en la nuna tempo, mondo, eono, kaj en la venanta. La eterna vivo promesita al la justuloj, en la konkludo de la rakonto, estas jam donacita al la disĉiplo nune por vivi. La disĉiplo estas en la mondo sed ne plu apartenas al la mondo. La disĉiplo estas fremdulo, vojaĝanto en tiu ĉi mondo, en ĉi tiu tempo. Li, ŝi, apartenas al alia eono, al eterneco, jam.

Fakte, malgraŭ ke ĝi utilas por bone kaj juste vivi, tiu ĉi parabolo ne estas referenco por sin mezuri. Jesuo ne demandas nin, ke ni nin mezuru ĉiam. Ni



ja scias ke ni estas pekuloj, sed pardonitaj pekuloj, engaĝitaj en alia regno, per alia leĝo, eterna, la leĝo de la nemeritita amo de Dio, kiun ni estas petataj respeguli al la nuna mondo, kiun ni estas petataj atesti al la nuna mondo.

Se tiu parabolo estus bildo de la fina juĝo de la nacioj, ĉu ĝi efektive koncernus la disĉiplojn? Certe ne en tio ke ĝi estus la kriterio por saviĝo. Pli efike en tio ke ĝi indikas la trafan manieron vivi la Regnon de Dio inter la bezonantoj.

Tiu ĉi rakonto parolas pri apartigo. Oni komprenis ĝin kiel juĝon. Tamen, ni ne forgesu ke apartigo estas ankaŭ sinonimo de sanktigo. Ĉu ne pli bone ni povas preni por ni tiun signifon, ke nia apartigita vivo de disĉiplo de Jesuo troviĝas ne en la pasintaj agoj — ni ja estas pekuloj — sed en la postulata konduto al la bezonantoj. Tio ne

koncernas nian saviĝon. Tio koncernas la bezonojn de tiuj malgrandaj de la rakonto.

Kaj inter ili troviĝas la fremdulo. Ni kredantoj, nun apartigitaj, fremdaj en ĉi tiu mondo, ne povas neglekti, ignori la fremdulojn en tiu mondo kie ni vivas kaj atestas.

La akcepto, la gastigo de la fremdulo, de la ekzilito, de la enmigrinto, de la rifuĝinto, apartenas al la ĝustaj agadoj de la justuloj, al la karakterizoj de la Regno de Dio.

Fine de la parabolo de la bona Samariano, al la leĝisto kiu ĵus diris ke la proksimulo estas tiu kiu faris kompaton, Jesuo diris, kaj mi finos per tio : *Iru vi, kaj faru tion saman.*

Amen

El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

17. decembro

Ho amanta Dio, mi neniam hontu por konfesi Vin antaŭ aliaj homoj, ankaŭ se ili mokas pri Vi. Mi vivu kiel ekzemplo laŭ Via Evangelio.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso en la kolofono). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.



Apostoloj kaj iliaj atributoj

Prezentita dum la ekumena kongreso en Poděbrady 2018

Sesa kaj fina parto

Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

Simon

La vivo de apostolo Simon estas enigmo, aŭ pli precize ni mal-multe scias pri li. Li kaj Judas Tadeo kaj Jakobo la pli juna estis fratoj.

Marko kaj Mateo nomas lin Kanaa, Luko nomas lin la fervorulo, aŭ zeloto. Tiu ĉi lasta nomo povas aludi al tiu juda grupiĝo, kiu eĉ per perfortaj agadoj batalis kontraŭ Romo.

Simon unue en Egiptio, poste en Persio predikis la evangelion.

Pro tio oni ofte prezentis lin kun segilo – tio estas lia atributo – ĉar en Persio, kune kun Sankta Tadeo, li estis mortigitaj per segilo, oni duontranĉis ilin.



Pentraĵo de Caravaggio, ĉirkaŭ 1600



En preĝejo en la vilaĝo Habo en suda Svedio, ĉirkaŭ 1723



Baziliko de Sankta Johano en Laterano
Giuseppe Mazzuoli (1644-1725)

Tadeo

Pri lia vivo estas malmultaj kred-
eblaj informoj. Mateo nomas lin
Judas Tadeo, Luko donas la
nomon Judas Jakobo. Laŭ la legendo li
martiriĝis kune kun Simon, kiam oni
tratondis ilin per segilo, aŭ per hale-
bardo – pro tio estas lia atributo la
halebardo.

Laŭ la tradicio, post la resurekto de
Jesuo, Tomaso sendis Tadeon al Edeso
al la reĝo Abgar, ĉar la reĝo sendis
leteron, en kiu li skribis:

*“Reĝo Agbar, la filo de Eucharis, al
Jesuo, la boneca Savanto, kiu aperis en la
ĉirkaŭaĵo de Jerusalemo, sendas saluton.
Atingis min via famo, kaj la famo de la
resanigoj kiujn vi faras, kaj tio, ke vi faras
tiujn sen iu ajn ŝmiraĵo aŭ herboj, kaj per
viaj vortoj vi redonas al la blinduloj ilian
vidkapablon, al la lamuloj ilian irkapablon,
vi purigas la leprulojn kaj revivigas
mortintojn.*

*Laŭ tiuj informoj mi povas imagi, ke
aŭ vi estas Dio, kiu malsupren venis el la
ĉielo, por fari tiujn agadojn, aŭ vi estas la
filo de Dio, kiu faras tiujn agadojn. Pro tio
en mia letero mi petus vin, ke vi venu al
mi kaj resanigu min el mia malsano, en
kiu mi jam tiel longe suferas. Mi aŭdis
ankaŭ tion, ke la judoj grumblas kontraŭ
vi, kaj volas mortigi vin.*

*Do vi venu al mi, ĉar mi havas mal-
grandan, sed honestan urbon, en kiu
estas loko al ni ambaŭ!”*

Poste en Mezopotamio, en Pontus
kaj en Persio, li predikis. Fine, en Persio
li mortis martire.

Laŭ la legendo kiam Tadeo aperis
antaŭ la reĝo, pura lumo radiis el lia
vizaĝo kaj la reĝo tuj konvertiĝis.
Tadeo kovris la lepran malsanan
vizaĝon de la reĝo per tuko, sur kiu estis
la vizaĝo de Jesuo Kristo, kaj la reĝo tuj
resaniĝis.



Jesuskirken, Kopenhago,
fino de 19a jarcento

Skulptaĵo de la hungara
skulptisto István
Rohonczi (1957-) en la
hungara vilaĝo Apostag



La tuko de Edessa, 10a jc.
Monaĥejo Sankta Katarina, Egiptio.

Berlina muro...

30 jaroj post la malkonstruo de la berlina muro

El Vikipedio

Ĉi-jare, en novembro, ni rememoris la forfalon de la berlina muro.

En Vikipedio ni trovas la jenajn informojn.

La berlina muro aŭ simple la muro, nomita ankaŭ “kontraŭfaŝisma remparo” en propaganda lingvo de la iama Germana Demokratia Respubliko (GDR), estis parto de la intergermana limo, kiu dividis de la 13a de aŭgusto 1961 ĝis la 9a de novembro 1989 okcidentan Berlinon de la orienta parto de la urbo kaj de la ĉirkaŭa tereno de la GDR. Ĝi estis unu el la plej famaj simboloj de la malvarma milito kaj de la disdivido de Germanio.

Pli ol simpla muro, la berlina muro estis fakte tuta defendokonstruaĵo kun du muroj, inter ili malplena strio, rondirvojo, gardturoj kaj alarmsistemoj. Dum la provo transiri la severe garditan limon al okcidenta Berlino multaj homoj estis mortigitaj. La preciza nombro de viktimoj estas pridisputita kaj ne certa;

la nombroj anoncataj varias inter 86 kaj 238 mortintoj.

La malplifortigo de Sovetunio kaj la politiko de liberigo gvidita de Mihail Gorbacov ebligis al la orientgermanoj faligi la 9an de novembro 1989 la muron de la honto per impulso kiu surprizis la tutan “liberan mondon”. Tiu evento estis la eko de la germana reunuiĝo.

Kvankam preskaŭ tute detruita, la muro restas memorloko al kiu pluraj muzeoj estas dediĉitaj. La cikatroj, kiun ĝi lasis en la urba organizo de la nova germana ĉefurbo ankoraŭ ne estas neniigitaj. La berlina muro daŭre ludas gravan rolon en la germana fikcio, eĉ okcidenta, kiel atestas multaj libroj kaj filmoj. ☾



Berlina muro.

Vikipedio, far Noir, CC BY-SA 3.0,



Gardturo en la iama mortostrio.

Vikipedio, far de Denis Apel / flyingpixel.de / Wikipedia

... kaj la Fera kurteno

El Vikipedio

Fera Kurteno estas esprimo uzita en kapitalismaj landoj por nomi la dividon inter la komunistaj nacioj de orienta Eŭropo kaj la nekomunistaj nacioj de okcidenta Eŭropo dum la Malvarma milito. Fera kurteno aludas al la izoleco, kiun Sovetunio trudis al siaj satelitaj nacioj en orienta Eŭropo, kaj al la subpremaj rimedoj de multaj registaroj de orienta Eŭropo.

La esprimon *Fera kurteno* kreis Winston Churchill, en 1946:

De Szczecin ĉe la Balta maro al Triesto ĉe Adriatiko, fera kurteno malsuprenvenis tra la kontinento. Trans tiu linio, situas ĉiuj ĉefurboj de la antikvaj regnoj de Meza kaj Orienta Eŭropo: Varsovio, Berlino, Prago, Budapeŝto, Beogrado, Bukareŝto kaj Sofio; ĉiuj ĉi famaj urboj kaj la loĝantaroj ĉirkaŭe situas en tio, kion mi devas nomi la sovetia sfero, kaj ĉiuj ricevas, tiel aŭ alie, ne nur sovetian influon sed tre altan kaj iukaze kreskantan regon de Moskvo.

Fakte la divido de la mondo estis rezulto de la dua mondmilito. La venkintoj super faŝistaj Germanio, Italio kaj aliaj ŝtatoj t.n. aksaj potencoj, decidis dum kelkaj konferencoj dividi la mondon. Dum la malvarma milito la kapitalista bloko finfine sukcesis per vetarmado kaj propagando, ekonomia supereco, altrudo de kapitalisma kulturo, forigi la feran kurtenon, de ili mem kunkreitan.

La plej videbla realigo de la Fera Kurteno estis la Berlina Muro, dividanta la anglan, francan kaj usonan sektorojn

de Berlino el la sovetia sektoro kaj Germana Demokratia Respubliko (GDR).

Oni ekmalkonstruis la feran kurtenon en Hungario printempe 1989 (tutsimple ĉar la malnoviĝinta barilo bezonis riparon kaj la hungara registaro ne volis elspezi la necesan grandan monsumon).

Solena simbola malfermo kun politikistoj okazis ĉe vilaĝo Sopronpuszta la 27an de junio 1989. Ankaŭ tio helpis la rapidan kolapson de la iama GDR, post amasa elmigrado de germanoj trans Hungario al okcidenta Germanio. Oni starigis tie 15 jarojn post la ceremonio memorajon.

Nunepoke, kelkaj komparas la novajn malfaciligajn rimedojn establitajn de Eŭropa Unio kontraŭ ekstereŭropaj enmigruntoj, por malhelpi ilin eniri, ege limigi azilrajton ktp, kaj kiuj kaŭzas foje mortojn, je ia nova Ferkurteno.

☞



Konservita parto de la fera kurteno apud Čížov, CZ
Vikipedio, far Ladin, CC BY-SA 3.0,

Legnica estas bela, historia urbo en la Malsupra Silezia Vojevodio, situanta ĉe la rivero Kaczawa, proksime al Jawor kaj Lwówek Śląski, ĉirkaŭ 60 km okcidente de Wrocław.

La historio de ĉi tiu centro estas longa, ĉar la unuaj dokumentitaj spuroj de slava setlejo en ĉi tiu regiono datiĝas de la 8-a jarcento. Ĉi tie estis defenda fortikaĵo. La nomo Legnica aperis unuafoje en 1149 en la dokumento de Pola Princo – Bolesław Kędzierzawy

En 1241 Legnica fariĝis ege grava loko sur la mapo de Eŭropo, ĉar proksime al Legnica okazis en Legnickie Pole la fama batalo kontraŭ mongoloj kiu, kiel iuj kredas, kvankam perdita, savis okcidentan kulturon de ekspansio de Islamo.



Komerca placo kun baroka kaj neoklasika arĥitekturo. /Far de SchiDD - CC BY-SA 4.0,

Tiutempe Legnica estis la dua plej granda silezia urbo post Wrocław.

La nuntempa spac-sistemo de la urbo datiĝas de la fino de la 19a kaj komenco de la 20a jarcento. En Legnica oni povas trovi multajn belajn monumentojn, certe la Piast-kastelo staras unuavice, sed krom ĝi indas levi la okulojn al la katedralo de St. Petro kaj Paŭlo, Preĝejo de Sankta Maria, Urbodomoj (malnova kaj nova), turoj kaj aliaj interesaj konstruaĵoj. Ravaj estas la tiel nomataj haringejoj, tio estas haring-standoj kun arkaĵoj alkrōcitaj al la Malnova Urbodomo en la Merkata Placo en Legnica. Rimarkindas pro historiaj kialoj certe la bela baroka preĝejo de St. Johano, kie vi povas viziti la Maŭzoleon de Piast-dinastio.

Legnica ankaŭ estas urbo de verdaĵoj, situanta en la Nacia Reto de Sanigaj Polaj Urboj. Je ĉiu paŝo ni renkontos ĉi tie belajn verdajn areojn, kiuj ne nur plibonigas vivkondiĉojn, sed ankaŭ emfazas kaj plibonigas la bildon kaj belecon de la Malnovurba Kvartalo. La plej mirinda verda loko por ripozi en Legnica estas la urboparko situanta en la urbo-centro kaj enhavanta la Palmejon. Fontanoj ankaŭ aldonas ĉarmon al Legnica. La urba parko estas loko de aktiva ripozo.

ALIĜILO

al la kristana kongreso,
8-15 aŭg. 2020 en Legnica, Pollando

Temo: „... kaj gardu ĝin” (Gen. 2,15)

S-ro [] / S-ino [] Persona nomo:

Familia nomo:

Adreso:

Lando (en Esperanto):

Urbo/vilaĝo: Poŝtkodo:

Strato kaj numero:

Telefono:

Retadreso:

Mi estas membro de: IKUE [] / KELI [] / ne estas membro []

Naskiĝjaro:

Mi deziras dividi la ĉambron kun:

Mi deziras loĝi sola (kaj pagi pli altan kotizon): []

Mi planas alveni je (dato kaj horo, se eblas):

Mi planas foriri je (dato kaj horo, se eblas):

Mi planas alveni per: aŭtomobilo [], trajno [], buso [], aviadilo []

Mi estas vegetarano: [] Mi bezonas alian dieton:

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo:

Prelegon laŭ temo:

Programerojn por distra vespero:

Alian programeron:

La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo

Informojn pri pag-eblecoj kaj informa konsento, vi trovos sur paĝo 134 kaj 135.

Subskribe mi konfirmas la Informan Interkonsenton kaj aliĝas al Kristana Kongreso.

Dato: Subskribo:

Kongresaj kotizoj

Pageblaj en eŭroj (EUR)

Aliĝ-kotizo: (ne repagebla) por ĉiu persono pagenda antaŭ la kongreso
(**Tarifo A:** iamaj socialismaj landoj de Eŭropo. Ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko kaj Latina Ameriko, **Tarifo B:** ĉiuj aliaj landoj)

| | A-kategorio | B-kategorio | Junulo ĝis 26 jaroj |
|-----------------|-------------|-------------|---------------------|
| ĝis 31 01 2020 | 20 EUR | 40 EUR | 10 EUR |
| ĝis 31 03 2019 | 30 EUR | 50 EUR | 10 EUR |
| post 01 04 2019 | 40 EUR | 60 EUR | 10 EUR |

NE-membroj de IKUE/KELI pagas + 5 EUR

Kongresa kotizo: pagenda en la kongresejo:
(kongreskotizo inkluzivas tranoktojn, manĝojn kaj aŭtobusan ekskurson al Lubiąż)

A: 180 EUR (dulita ĉambro) **B:** 250 EUR (dulita ĉambro)
Krompago por unulita ĉambro: + 50 EUR

Informo kaj metodo de antaŭpago:

- Ĝiro, detalojn vi trovas sube,
- UEA-konto de KELI, **kelk-p**, vidu detalojn sur paĝo 142

Mi antaŭpagas sumon (EUR):

Libervola donaco al la kongresa kaso (EUR):

La aliĝon oni traktos kiel validan post ricevo de aliĝ-kotizo!
Aliĝ- kaj kongreskotizon oni povas sendi al:

Internacia ĝiro en eŭro:

Teresa POMORSKA

Ul. Świstackiego 9/21, 50-430 Wrocław

IBAN: PL 13 1940 1076 4896 8264 0000 0000

SWIFT (BIC): AGR IPLPR

Pagoj por poloj, en PLN per ĝiro (1 EUR = 4 PLN):

Teresa POMORSKA

ING Bank 55 1050 1575 1000 0092 5359 8644

La aliĝilon sendu al:

Teresa POMORSKA

Perletere: Ul. Świstackiego 9/21, 50-430 Wrocław

E-mail: pomer@wp.pl

Loĝado

Ĉefa kongresa loĝ-bazo kaj kongresejo estos Alta Porpastra Seminario de Legnica diocezo, kiu troviĝas ĉ. 500 metrojn de Malnova Urbo kaj 1500 metrojn de legnica stacidomo en bela trankvila kvartalo de la urbo. Ties adreso estas: Legnica, strato de Johano Paŭlo la Dua 1.

Por dispono de partoprenantoj atendas sufiĉe larĝaj dultitaj ĉambroj – plejparte sen banĉambro ene, tamen kun komfortaj necesejoj kaj duŝejoj de du flankoj sur ĉiu etaĝo. Multaj diversgrandaj salonoj, bone ekipitaj de ĉiuj modernaj teknikaĵoj permesas organizi okupojn en diversnombraj grupoj. Surloke estas kapelo kaj kunvena salono kun muzik-instrumentoj kaj eskerordinara manĝejo, kiu povas nutri eĉ. 200 personojn. Ekzistas ekstera ĝardeneto.

Se iu pro iu ajn kialo volas loĝi aparte de la kongresejo oni povas trovi diversprezajn kaj diversnivelajn loĝejojn en la urbo ekz. hotelon Qubus, hostelon “Kolorowa”, studentan hejmon aŭ junularan gastejon

Ne forgesu kunporti vian Biblion kaj vian Adoru-libron, ĉar tiujn ni uzos dum la kongreso. Kiu ne posedas nian ekumenan kantarono, Adoru, tiu povas aĉeti aŭ prunti ĝin en la kongresejo.

Kongresa kotizo

A: 180,- EUR **B:** 250,- EUR
Krompago por unulita ĉambro: + 50,- EUR

INFORMA INTERKONSENTO

1. Se Vi havas demandojn rilate al Kristana Kongreso, bonvolu kontakti rete s-non Teresa Pomorska: pomer@wp.pl
2. Sendu la pagon al unu el la indikitaj banko-kontoj de la LKK. Oni traktos la aliĝon nur post alveno de la pago.
3. Se vi pagas por alia persono, kiu nepre devas sendi apartan aliĝilon, menciu precizajn informojn pri la koncerna persono: nomo, lando, kompleta adreso.
4. Kongres-kotizo neniukaze estas repagebla. La pagoj por la ceteraj servoj estas repageblaj post la depreno de 10% por administrado, kondiĉe ke LKK ricevos la malmendon ĝis la 31-a de majo antaŭ kongreso.
5. LKK konfirmos per Konfirmilo la akcepton de ĉiu aliĝilo post la ricevo de la koncerna pago per indiko de via kongresa numero kaj de ĉiuj antaŭmenditaj kaj antaŭpagitaj servoj.
6. LKK havas la rajton ŝanĝi la prezojn pro granda inflacio aŭ se aliaj neantaŭvideblaj kondiĉoj postulos tion.
7. Mi konfirmas, ke mi konsentas kun la ĝeneralaj instrukcioj presitaj en ĉi tiu aliĝilo kaj aparte deklaras, ke mi havas san- kaj akcident-asekuron por mia restadperiodo en Legnica, en Pollando, dum la Kristana Kongreso.
8. Mi konsentas, ke miaj personaj datenoj estas konservataj por la bezono de la kongreso.

Grete Burkhardt

23.9.1933 — 9.11.2019

Adiaŭon al Grete Burkhardt kaj dankon al ŝi
funebra parolo de Alois Eder

**Kara funebra komunumo,
karaj Ulrike, Georg, Regina kaj viaj familioj kaj parencoj,**

ankaŭ la Esperanto-amikoj de la familio Burkhardt volas diri vorton de adiaŭo al Grete Burkhardt, kaj vorton de danko al ŝi. Grete estis la animo de la Domo Burkhardt. Sen ŝi la agado de Adolf Burkhardt ne estintus ebla en la konata vasteco. Adolf Burkhardt estis verva predikanto, Grete radiis patrinan varmon en la familio kaj ankaŭ en la eklezia komunumo. Adolf estis viro de la vorto kaj de lingvoj, Grete estis la koro de la gastamo en la pastora domo. Certe ne estis facile por Grete, vivi kiel edzino de viro tiom multflanke aktiva. Spite al tiu defio Grete restis ĉiam ŝi mem. Adolf plenumis minimume du profesiojn, unuflanke kiel pastoro paroĥa kaj aliflanke kiel poresperantuja pastoro, krome kiel serĉata tradukisto kaj interpretisto en internaciaj bibliokursoj anglalingvaj kaj foje ankaŭ esperantlingvaj. Ni Esperanto-amikoj multon dankas ne nur al Adolf Burkhardt, sed same ankaŭ al Grete Burkhardt pro ilia engaĝiĝo por Esperanto. La gravecon de Grete en la geedza duopo Burkhardt ni vizitantoj sentis, kiam ni estis gastoj en via familio. Kiel patrino kaj animatoro de la familio vi, Grete, zorgis por la etoso en la domo. Vi tri infanoj de tiu aktiva pastora familio ne sentis emocian mankon dum via junaĝo, pro la zorgemo kaj korvarmeco de

via patrino. Ankaŭ por la eklezia komunumo vi, Grete, estis aktiva partnerino de Adolf. Kaj same en liaj engaĝiĝoj vaste trans la limoj de lia paroĥo, vi apogis vian edzon.

Certe ne malofte vi devis prokrasti viajn proprajn personajn dezirojn. Ekz. vi ŝatintus multe pli ofte kontakti la parencojn, ol eblis – tion vi mem iam diris



al mi. Tiom bele sonas viaj tradukoj de ekleziaj kantoj, Adolf, sed mi supozas, ke Esperanto ĉe viaj infanoj ankaŭ kaŭzis fojfoje missonojn, kiam paĉjo denove estis for, ĉu ne, Ulrike, Georg, Regina? Ĉiam, kiam eblis, la patrino akompanis sian edzon al Esperanto-okazaĵoj, kaj vi infanoj rajtis kunvojaĝi al Esperanto-kongresoj kaj -renkontiĝoj, kion vi ankaŭ ĝuis pro la kontaktoj kun aliaj gejunuloj. Ĉiam la kantado kaj ankaŭ la muzikado per instrumentoj akompanis vian familian kaj eksterfamilian vivon, je la ĝuo de ĉiuj.



Parto de la pastora domo servis kiel ejo de la Germana Esperanto-biblioteko, kiun Adolf Burkhardt rekonstruis kaj reordigis post la Dua Mondmilito. En ĝi Adolf pasis multon de sia libera tempo, laborante por savi la postlasitan kaj registri la kreskantan Esperanto-literaturon. Tio postulis limigon de la spaco por la familio. Nur ĉar Grete apogis tion, la entrepreno Germana Esperanto-biblioteko eblis. Adolf Burkhardt flegis la Germanan Esperanto-bibliotekon en nepagita honorofica laboro tiomgrade, ke ni hodiaŭ povas fieri pri impona Esperanto-biblioteko en nia lando. Spite al tiu engaĝiĝo de Adolf por la Esperanto-kulturo la familia vivo ne suferis – Grete garantiis tion.

Ankaŭ la iom malrobusta saneco de Adolf ofte kaŭzis viajn zorgojn, Grete.

Granda ĝojo de Grete Burkhardt estis la dancado. Ankaŭ por ni Esperanto-amikoj ŝi estis dancinstruistino kaj gajigis niajn festojn. Dum la ĉiujara Esperanto-festo en Stuttgart, la tielnomata Zamenhof-festo, la rondodanco, de Grete gvidata, vivigis la festan etoson. La esperantlingva diserva kantlibro „Adoru“, pri kiu ni kristanaj Esperanto-parolantoj estas tiom fieraj, certe ne ekzistus en la realigita kvalito kaj kompleteco, se ne Grete apogintus la kreaĵon de ŝia edzo. Do ni dankas ankaŭ al vi, Grete, la multajn belajn esperantigojn de bonkonataj liturgiaj kristanaj kantoj. Same ni dankas al vi la grandan Germanan Esperanto-bibliotekon en Aalen.



Grete, vi hejmen venis en la sinon de via Kreinto.

Dankon al vi. Kaj

... ripozu nun en la paco de Dio.

Alois Eder

Vi ĉirkaŭas min de ĉiuj flankoj

El la funebra parolo por Grete Burkhardt,
15.11.19 en Weilheim/Teck

Matthias Hennig

Karaj parencoj, karaj funebrantoj, por hodiaŭ Grete Burkhardt notis versiklon el Psalmo 139. Estis ŝia deziro, ke ni komprenu ŝian vivon laŭ ĉi tiu frazo: *“De malantaŭe kaj de antaŭe Vi ĉirkaŭbaris min kaj metis sur min Vian manon.”* (Psalmo 139: 5).

Tio estas la sumo, kiun Grete Burkhardt eliris el sia vivo. Konfeso al Dio, kiu estas ĉiam kaj ĉie en mia homeca vivo. Kaj konfeso al Dio, kiu estas bonvola kun sia protektanta kaj benanta mano, kiun li tenas super mi. Grete Burkhardt hodiaŭ prezentas al ni sian kredon kaj sian vivosperon: *“Vi ĉirkaŭas min de ĉiuj flankoj, Dio”*.

Kiujn flankojn havis la vivo de Grete Burkhardt? Kiuj facetoj apartenis al ŝia personeco? Kiaj estis ŝiaj spertojn – kaj kiel ĉiuj spertoj evidentiĝis al ŝi, ke kiam ŝi estis tre maljuna, ŝi povis diri: *“Vi ĉirkaŭas min de ĉiuj flankoj, Dio”*?

Unu flanko de ŝia vivo estis ŝia deveno. Rakontindas pri la familio Schmid, ke la patro de Grete Burkhardt, Ewald Schmid, estis pastoro, kaj la patrino Ruth Schmid, devenis de la misiista familio Hecklinger, kiu laboris en Kamerunio. Do la kristana fido, kristanaj kantoj kaj preĝoj – tiuj estis kun Grete Burkhardt jam en la lulilo, kiam ŝi

naskiĝis la 23an de septembro 1933 en Tieringen. Kompreneble en la familio Schmid kun la kvin infanoj Dio de multaj flankoj ĉeestis.

Mi ne povas diri, kiel ekzakte la medio de preĝo kaj kantado, de sonoriloj kaj preĝejoj servoj influis la kreskantan Grete. Sed tion eblas diri, ke la memkomprenebla ĉeesto de Dio kaj la natura adoro de Dio formis en Grete la deirpunkton de la dumviva kreskanta konfido al Dio. Jes, tiel ŝi kreskis kaj maturiĝis en la fido – ŝiaj vivo-demandoj kaj duboj de fido unuflanke, ŝia kompreno pro nove gajnita Dia certeco de la alia. Mi spertis ambaŭ en la konversacioj kun ŝi: alta maturiĝo, direkte al hela, dankema, serena fido al Dio – kaj simile kresko en la profundo de fido, al kio apartenas luktado, glavo kaj sufero.



Kiel povus esti la vivo por la dek-jaraĝa Grete? La familio en 1938 translokiĝis al Plattenhardt, la germanoj komencis la militon la jaron poste. Grete envenis la elementan lernejon en Plattenhardt, kaj ŝi estis en la lasta bazlerneja klaso, kiam la unuaj aeraj atakoj de la aliancanoj okazis super Stuttgart kaj Fildern. Ŝiaj gepatroj decidis, ke Grete devas iri al avino en Wilhelmsdorf. Sola. – Ankoraŭ en la alta aĝo ŝi rakontis, kiel ŝi suferis tiutempe pro la soleco, pro la distanco kaj pro la malvarmeto, kiu radiis de la avino, kaj precipe pro la distanco for de la gepatroj kaj gefratoj.

La kresko en la profundon de fido kaj la sufero, kiu troviĝas en ĝi – en la 139a psalmo: ke Dio ĉirkaŭas min de ĉiuj flankoj, antaŭ ĉio, ne diras, kiel proksimaj aŭ malproksimaj estas la diversaj flankoj de mia vivo. Oni povas do sperti tiel, ke Dio estas tre malproksima. Eble Grete Burkhardt, kiu tiutempe havis dek aŭ dek unu jarojn, kiel knabino deziris nenion pli, ol ke Dio estu ĉe ŝi, ke Li donu al ŝi la patrinon, la patron aŭ la fratinnon.

Sed same kiel la psalmisto, Grete spertas tion, ke la konscio pri Dio ne signifas esti proksima al Dio; kaj ke la memkomprenebla ĉeesto de Dio ne signifas, ke oni persone spertas la Dian atenton. Jes, Dio ĉirkaŭas Grete. Sed necesas alia flanko de ŝia vivo ne nur alfronti Dion, kiel tiun, kiu ĉirkaŭas ŝin, sed renkonti Lin, kiel tiun, kiu parolas kun ŝi.

Alia flanko en la vivo de Grete Burkhardt kompreneble estis la familio,

kiun ŝi fondis kun Adolf Burkhardt. En unu Kantosemajno ili renkontiĝis kaj fianĉiĝis en 1957, kaj geedziĝis en 1959. Tri infanoj naskiĝis. Grete Burkhardt dediĉis sin al sia kamarado kun ĝojo, estis patrino kun korpo kaj animo. Tiel same ŝi estis avino: komence ludante, bakante kaj lernante la manlaboron, sed poste ankaŭ en temoj kiel medioprotektado kaj Greenpeace.

Specife, Grete Burkhardt involviĝis en la vivon de sia edzo Adolf kaj en lian laboron kiel pastoro. Tio eble bone esprimas la Psalmojn 139 denove. Oni preskaŭ volus diri: “Ŝi ĉirkaŭis lin de ĉiuj flankoj”. Ĉi tio estis necesa ankaŭ en la kazo de teologo kaj intelektulo, kiu dum studado kaj predikoskribado, forgesis, ke li havas nenion kontraŭ la malvarmo; aŭ kiu apenaŭ agnoskis, ke li retiriĝos en la aĝo de 65 jaroj kaj tiam ne plu havos la tegmenton de la Bissingera pastora domo super la kapo. Estis Grete Burkhardt, kiu estis kapabla vivi, bone organizita, pensema kaj foje antaŭvidante “eltiris la karbojn el la fajro” de la ĉiutaga vivo. Jes, Grete Burkhardt estis “pastor-edzino” en la plej bona senco.

Multaj aliaj flankoj estus eblaj preparoli. Ĉio kondensas al la impresoj, ke Dio ĉirkaŭas Grete Burkhardt kaj nin, kaj ne nur ĉiuflanke ĉirkaŭas nin, sed de multaj flankoj venas al ni, helpas nin vivi, portas nin tra morto kaj transformas nin por la eterna vivo.

Amen

Iaj specialaj esprimoj konsistas el du samaj O-vortoj ligitaj per rolvorteto. Ekz. paŝo post paŝo, mano en mano, tago post tago, vizaĝo kontraŭ vizaĝo. Tia esprimo aperas plej ofte en frazrolo, kiu principe bezonas ian rolmontrilon. Zamenhof tamen normale ne uzis rolmontrilon ĉe la unua O-vorto. Li plej ofte traktis tiajn esprimojn kiel tutaĵojn, opiniante, ke la rolvorteto inter la du O-vortoj sufiĉas por montri la frazrolon de la tuta esprimo.

Nuntempe multaj preferas uzi N-finaĵon aŭ alian rolmontrilon ĉe la unua vorto, kiam la frazrolo tion postulas. Tio estas gramatike pli logika, sed la Zamenhofa dirmaniero restas bona, kaj eĉ sufiĉe eleganta alternativo. Ifoje oni povus alternative E-vortigi la tutan esprimon:

- *Ni **paŝo post paŝo**, post longa laboro, atingos la celon en gloro. Aŭ ...paŝon post paŝo..., ...**per paŝo post paŝo**...*
- ***Mano en mano** la gefianĉoj promenadis. Aŭ manon en mano, **kun mano en mano**, man-en-mano.*
- *Sur ĉevalo aŭ sur piedoj ili ĉiam estis kune, **flanko ĉe flanko**.*
- *Ni dormadis **kapo ĉe kapo** sub la laŭra tegmento de la kabano.*
- *Ili en longa vico dormis **flankon ĉe flanko**. Ĉi tie Zamenhof ja uzis rolmontrilon, N-finaĵon.*
- *Forte batis **koro ĉe la koro**. Ĉi tie la unua koro estas subjekto, kaj nepre ne havu rolmontrilon.*



Esperanto-gramatiko


Karaj kaj estimataj, kun granda ĝojo mi informas, ke nun mia **malgranda Esperanto-gramatiko**, kiu jam haveblas en dana, germana, angla, franca, itala kaj hispana versioj, nun ankaŭ en flandra/nederlanda versio.

Se vi legos la komentojn sur la paĝo:

<http://esperanto-gramatiko.saluton.dk/esperanto-gramatiko-supperrigardo/Esperanto-gramatiko%20informoj/>,

vi espereble konsentos, ke ne estas tro granda memlaŭdo mia la aserto, ke tiu kajero estas bonega helpilo por komencantoj, havebla je tre malalta prezo. Pro tio mi petas vin ĉiujn rekomendi la kajeron al komencantoj kaj Esperanto-instruistoj.

Mi dankas pro via subteno. Amike,
Peter Weide



Informaĵoj

Kunĝoju !

La interreta portalo

KRISTANAJ FONTOJ ĵus fariĝis 9-jar-aĝa.

* la 1an dimanĉon de Advento 2010

Akuŝisto: Albert J. Urban

- Vizitu: fontoj.net
- *Esploru!*
- *Ĉerpu!*

Kore salutas vin
Albrecht Kronenberger

Unua paĝo



Elektu vian gvidvorton:

Adoru
Biblio
Breviero
Meslibro
Traktatoj
Trezorejo

preĝi
mediti
ricevi instigojn
kanti
muziki
informiĝi



Belan kristnaskan feston & Sukcesan novan jaron

al ĉiu leganto de Dia Regno deziras
la sekretario & distribuanto kaj la redaktoro

Pavel POLNICKÝ &
Bengt Olof ÅRADSSON

Membriĝo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno per pago de la kotizo kaj sendo de la adreso al la kasisto

Kotizoj de KELI 2020

| | |
|--|------------|
| Individua membro (kun Dia Regno) | 20,00 EUR |
| Familia membro (sen DR) | 2,00 EUR |
| Subtenanta membro (kun DR) | 30,00 EUR |
| Dumviva membro (20-obla jarkotizo) | 400,00 EUR |
| Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI, | 16,00 EUR |
| pagante tra libroservo | 18,00 EUR |
| KELI-anoj abonas Espero Katolika (eble nur reta) pere de KELI-kasisto | 12,50 EUR |
| IKUE-anoj rajtas aboni Dia Regno pere de C.O. de IKUE | 10,00 EUR |
| Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj | 2,00 EUR |
| Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj ricevi Dia Regno-n) | Donaco |

La liga gazeto Dia Regno aperas 6-foje jare

Pagmanieroj:

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Poŝtĝire al **UEA**, Rotterdam, kaj menciu: por KELI-konto **kelk-p**
konto-numero en Belgio: 000-163 1831-97
Germanio, Köln: 3182 91 509, BLZ 370 100 50
Svedio 74374-0
Svislando (Bulle): 12-2310-0
3. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
4. Per ING BANK en NL al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam, menciu:
por KELI-konto **kelk-p**: BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72 INGB 0000 378 564
5. CIC-BANK en Francio por KELI. BIC: CMCIFRPP, IBAN: FR76 1009 6182 45.
6. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:
Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Klauzál utca 32, HU 1072 Budapest, Hungario;
① +36 302 000 306; ✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Membriĝo ĉe KELI (kaj la nacia sekcio) per la landa
reprezentanto, kiun vi bonvolu kontakti.

Landaj kotizoj:

Britio: 15 GBP
Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006
"Fellowship of British Christian
Esperantists (FBCE).

Kasisto: S-ino Jean Bisset, 47 Airbles
Crescent, Motherwell, ML1 3AP;
✉ jean@bisset100.freeserve.co.uk

Bulgario *)

Peranto: S-ino Ivanka Kircheva
Stoyanova
P.O. Box 701, BG-9000 Varna
☎ + 359 52 639628,
✉ ivanka_esperanto@abv.bg

Ĉeĥa Respubliko 450 CZK kaj**Slovaka Respubliko** *)

Peranto: Pavel Polnický,
Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio,
☎ +420 723 672 335,
✉ polnickypavel@seznam.cz

Estonio

*)
Peranto: Endel Ojasild, PK. 24,
EE-10502 Tallin,
✉ endel.ojasild@gmail.com

Finnlando 30 EUR

Eblas aboni Dia Regnon uzante landan peranton de UEA aŭ laŭ la pagmanieroj menciitaj sur antaŭa paĝo.

Francio 25 EUR

CCP n-ro 10 456 15 U Paris,
“Franca Evangelia Esperanto-Ligo (FEEL)”. Kasisto: Samuel Gaillard,
5 rue Maurice Ravel,
FR-63800 Cournon d’Auvergne
☎ +33 (0)4 73 84 31 31,
✉ samuel.gaillard@ac-clermont.fr

Germanio 24 EUR

Evang. Darlehns-genossenschaft
Kiel n-ro 47 00 40, BLZ 210 602 37
“Esperanto-Liga für Christen in
Deutschland e.V.”
Kasistino: Hedwig Fischer, Gustav-
Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde,
☎ 02573 / 626,
✉ hetifisch@googlemail.com

Hungario *)

Peranto: Irén Bagi, Baross u.
54/B.II.8, HU 1201 Budapest
☎ 01 283 6566

Nederlando

20 EUR
Vidu sub la pagmanieroj sur la antaŭa paĝo

Pollando

20 EUR

Rumanio *)

Peranto: Maria László, OF1.C.P.
38 Exterior, 4800 Baia-Mare
☎ 062 426182,
✉ laszlo_maria@yahoo.com

Slovaka Respubliko *)

Vidu ĉe Ĉeĥa Respubliko

Svedio 20 EUR

Pagu al la sveda UEA-konto
(vidu antaŭan paĝon, punkto 2)

Svislando 20 EUR

Pagu al la svislanda UEA-konto
(vidu antaŭan paĝon, punkto 2)

Usono 30 USD

Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton al la peranto: Jerald T. Veit, 3578
S. Taylor, Milwaukee, WI 53207
✉ jeraldveit@yahoo.com

*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto

Brilu, stel', de l' ciel'

GOTTES STERN, LEUCHTE UNS



1. Di - a lum' de l' kre - o.
2. voj - mon - trill' al vi - vo.
3. sig - no de l' pro - me - so.



En mond-mal - hel', en nokt - ni - grum',
Ho - mi - gas Di' en Bet - le - hem';
Per Li - a kruc' el am - in - klin'



or - do - nas Di', ke es - tu lum'.
a - pe - ras Li, la vi - vo mem.
la sav' por ni ple - nu - mas sin.



Ci - on kre - as Di' kun fort'.
Ma - goj vo - jas el lon - tan',
Li - a Spir' kon - du - kas nin



Fi - du, hom', al Li - a vort'.
go - jas pri la Di - in - fan'.
tra la tem - poj gis la fin'.



1.-3. Ni vi - dis bri - li Li - an



ste - lon, 1. kaj ve - nas kun go - jo.
2. a - do - ras kun go - jo.
3. kaj kre - das kun go - jo.

GOTTES STERN, LEUCHTE UNS • nGL 259 • M kaj germana T: Christoph Biskupek kaj
Oliver Sperling 1998 • © Carus-Verlag, Stuttgart • E: Albrecht Kronenberger 2018-11-28